

STARTO

N-ro 1/2018 (266)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Rekonstruado en nia muzeo dum la vintraj monatoj 2017-2018
Granda laboro ĉefe por la lokaj klubanoj

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Dagmar Martinková, Chelčického 51, 568 02 Svitavy, martinkova.sy@seznam.cz, — sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gyidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Kasisto: Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datumado, kontado)

Komitatano: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Esperanto-Muzeo en Svitavy, rilatoj al la urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, ĉefredaktoro de la asocia retejo kaj de asociaj retkomunikoj, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kavapech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle (kontaktojn rigardu en la antaŭa alineo).

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz

www.muzeum.esperanto.cz

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Polnický

Raporto pri agado de ĈEA

(daŭrigo)

Ciferecigado

Ankaŭ nia grupo por ciferecigado de literaturo kaj de dokumentoj laboris diligente. Konkrete Vladimír Türk, Jaroslava Malá, Andrea Švubová (= Andrea Hasala), Jindřich Košťálek, Jindra Dubinová, Karel Votoček kaj gvidanto Miroslav Malovec, post la konferenco en Kroměříž eklaboris ankaŭ Anna Gybasová.


Vladimír Türk skanis 1565 bildojn de dokumentoj pri Lančov kaj Miroslav Malovec 512 bildojn de leteroj, kiujn ricevis el eksterlando Karel Franc kaj kiujn oni proponis en aŭkro (= interneta aŭkcio). Ĉi tiujn bildojn ni lasis en niaj komputiloj kiel fotografajojn.

Krom tio ni daŭrigis tekstigadon (tajpadon) de malnovaj bultenoj el la 1950-aj jaroj, kiam nia asocio ne ekzistis kaj tial en la bultenoj troviĝas interesaj informoj pri nia tiutempa movado. La unuajn numerojn de la praga bulteno komence tekstigis Jindřich Košťálek kaj nun tiun laboron daŭrigas Andrea Švubová. Pacdefendanton el Plzeň redaktatan de Rudolf Burda komencis prilabori Jan Pospíšil, nun ĝi estas laboro de Anna Gybasová. Jaroslava Malá tekstigas medicinajn bultenojn de nia iama medicina sekcio. Miroslav Malovec ĝuis tekstigadon de la junularaj bultenoj *Junularo agu!*, *Tagiĝo* kaj *Fajrero*.

En tiuj materialoj ni trovis vere valorajn kaj interesajn informojn por nia projekto *Memoro de Ĉeĥa Esperanto-Movado*. Ekzemple rakontadon de Vlado Sládeček, tiam 25-jara knabo, pri liaj vojaĝoj tra Eŭropo sur riveraj ŝipoj, ĉar

li estis ŝipano kaj sciis verki serion da rakontoj pri siaj travivaĵoj.

Ni ankaŭ eksciis, ke la junularo havis 27 tre aktivajn grupojn, kiuj kunvenadis dufoje semajne kaj konkursis pri pli bonaj rezultoj. En la jaro 1956 ĉiuj bultenoj entuziasme skribis pri preparata oktobra konferenco en Olomouc, kie estis denove fondota nia tutŝtata asocio, sed en la lasta momento venis ordono el la ministerio, ke fondo de la asocio estas prokrastata al nekonkreta futuro.



Kiam mortis harpisto Václav Klička, oni eksciis, ke en sia aŭtobiografio li rakontas pri sia muzika vojaĝo tra Nederlando, kie li koncertis per sia harpo – kaj interkompreniĝis kun nederlandanoj per Esperanto. Post la milito estis renovigitaj famaj Esperanto-kursoj en Lázně Bělohrad kaj en la programo prelegis eksperantlingve loka ornitologo Zdeněk Klůz pri siaj esploroj de birdoj en Islando. Kaj vere, en la retejo de Lázně Bělohrad oni eĉ nun trovas informojn pri la menciitaj kursoj kaj ankaŭ pri la ornitologo, kiu sciis plurajn lingvojn, inter ili ankaŭ Esperanton. La praga bulteno informas pri forveturo de familio Ginz al Israelo kaj publikigis ilian leteron, kiun ili sendis post atingo de sia nova hejmo.

Tre interesa estis sciigo, ke operkantisto Zdeněk Švehla kantis esperantlingve ariojn el *Vendita Fianĉino* kaj lia

interpreto estis registrita kaj aperonta sur gramofona disko. La informojn alportis Heroldo de Esperanto kun lia foto, ankaŭ Tagiĝo kaj Praga Bulteno. Sed bedaŭrinde ni ne scias, kie la gramofondisko estas akirebla. Tamen estas grave scii, ke Zdeněk Švehla, kiu post kelkaj jardekoj ricevis ankaŭ Premion Thalia por sia tutviva majstreco, estis esperantisto.

Malovec enkomputiligis manuskripton de vortaro de Josef Řebíček kaj Fervojgardiston n-ro 47 de Josef Kopta, tradukon trovitan en Kilian-domo, kvankam ne plenumitan de Kilian mem, ĉar ĝi enhavas gramatikajn erarojn, kiujn tia spertulo ne farus. Pli verŝajna estus Jan Jičínský, kiu postlasis kelkajn rakontojn pri hundoj kaj pri sia junaĝo kun similaj mallertaĵoj.

Tiutempe la membroj de nia grupo laboris ankaŭ pri aliaj projektoj. Jaroslava Malá kun Vladimír Türk preparis plurajn podkastojn por Retradio, ĉefe Grekajn Mitojn, sed ankaŭ aliajn temojn. M. Malovec, Petr Diblík kaj J. Malá enĉehigis novan kurson de Lernu, kvankam la traduko ankoraŭ ne estas kompleta. Malovec ankaŭ esperantigis kelkajn ariojn por nova opero *Suferado de princo Sternenhoch*, ĉar la komponisto opinias, ke estas pli bone, se la aŭskultantoj ne komprenas la vortojn kaj aŭskultas nur la melodion.

La grupanoj tiutempe ankaŭ finiŝis kun la preparo de la nova vortaro, kiun kontrolis Karel Votoček, Jindřich Košťálek, hungara esperantisto Joseph Horváth kaj precipe Zdeněk Pluhař, kiu tre funde tralegis la vortaron dufoje kaj proponis multajn ŝanĝojn. La ĉeĥan lingvon en la vortaro kontrolis Helena Pšeničková, Jaroslava Malá faris definitivan enpaĝigon.

La tekstigitaj bultenoj estas legeblaj ĉe <http://esperantobrnno.cz/malnova/bulteno-historia.html> kaj la laboroj daŭras. Vladimír Türk nun skanas grandan skatolon da diversaj materialoj, antaŭ ol ili estos transdonitaj al nia muzeo.

La skanado ebligos uzi tiujn materialojn eĉ post jaroj sen neceso veturi al la muzeo, plie ili estos tiamaniere pli sekurigitaj por la futuro simile kiel oni pli frue uzis mikrofiĉojn.

Miroslav Malovec

Vendita Fianĉino kun voĉo de Zdeněk Švehla

„El gramofondiskoj ni aŭdis ariojn kaj duetojn el la opero „Vendita fianĉino“, kiun post kelkaj semajnoj aŭdos Esperantujo el la sendstacio Romo.“

(*Bulteno de EK Praha 34-35/1956*)

Kiam la sekretario de Tutŝtata Konsulta Kolegio Esperantista, s-ano Miloš Rudolf, vizitis s-ron Švehla por demandi lin, ĉu li volus kanti oper-ariojn en Esperanta traduko, tiam la fama tenoro deklaris, ke li tre aprobas la ideon sed ke, antaŭ ol preni sur sin tiun taskon, li lernos Esperanton, por bone kompreni la esperantlingvajjn vortojn kaj ankaŭ pro tio, ĉar li mem havas intereson posedi la internacian lingvon.

Post du monatoj li jam bone parolis Esperanton kaj komencis studi la tekstojn. Kunlaboras kun li du aliaj solistoj, s-ino Královcová kaj s-ro Tesař, kiuj estas membroj de la Esperantista Societo, kaj kunlabore kun spertuloj ili preparas la plej belajn ariojn kaj duetojn el la opero „Vendita Fianĉino“ de Bedřich Smetana. Ankaŭ s-ro Švehla aliĝis al la Esperantista Societo.

Heroldo de Esperanto 17/1955

Ĉu iu havas la gramofondiskon?

Paĝo Esperanto.cz ĉe la socia retejo Facebook

La socia retejo Facebook (Vizaĝlibro) estas tre populara ĉe junaj homoj, tial informoj tie publikigitaj havas pli grandan ŝancon atingi eĉ la neesperantistan publikon.



La nova paĝo estis lanĉita la 26-an de julio 2017. La 1-an de decembro 2017 „ŝatis“ la paĝon 195 homoj kaj 197 homoj „sekvis“. Celo de la paĝo estas preskaŭ ĉiutage aperigi iun novaĵon, plej ofte dulingve. Ne mankas ankaŭ informoj pri eventoj de ĈEA, sed ankaŭ pri aliaj interesaĵoj. Kun M. Hruška kunlaboras M. Nárožný.

www.facebook.com/Esperanto.cz/



En la fejsbuka retejo povas aperi tekstoj, fotoj, filmetoj, desegnoj, pri niaj kluboj same kiel pri la tutmonda movado, la vizitantoj povas aliĝi ankaŭ kiel amikoj de la retejo.

EL NIA HISTORIO

En 1956 foriris la familio Ginz al Israelo por ĉiam. Post alveno s-ino Marie Ginzová sendis al la Praga Bulteno leteron, en kiu ŝi priskribis la vojaĝon. La prezentita teksto el la Praga Bulteno 37/1956 estas samtempe ekzemplo de laboro de nia grupo por ciferecigado.

Ota Ginz kaj lia edzino Marie apartenis al la plej gravaj esperantistoj en nia historio, ilia filo Petr, pereinta en Aŭŝvico, estas tutmonde konata kiel simbolo de holokaŭsto simile kiel Anne Frank.

NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ

En nia kluba poŝto amasiĝas dank- kaj salutleteroj al familio Ginz. Ni tre ĝojas pro tiu ĉi fakto kaj publikigas hodiaŭ la unuan leteron de niaj geamikoj:

Sur la maro, inter Sicilio kaj Kreta, dimanĉe la 1-an de aprilo s/s Jerusalem

Karaj amikoj,

pasis nur malmultaj tagoj de post nia adiaŭo, sed al mi ŝajnas, ke mi travivis tutan epokon. Ni vidis tiom da eksterordinaraj aferoj, ni tiom aŭdis kaj sentis, ke estas por mi malfacile priskribi al vi eĉ nur etan parton de ĉio. Tamen mi klopodas:

Kiam do pasis kortuŝaj momentoj de nia disiro en Praha, ni ekveturis kaj nova audiaŭo atendis nin kun la samideanoj en Brno. Venas la limo – kontrolo de pasportoj – doganistoj. Ekscitigaj momentoj. Kvankam ĉiuj niaj aĵoj ĝis lasta poŝtuko estis enskribitaj, tamen en stacidomo en Praha ni ricevis tiom da donacoj de vi, karaj samideanoj, ke mi timis, ĉu mi povos kunporti ilin.

Ĉio pasis en trankvilo – dogano kaj ankaŭ pasportkontrolo flanke de ĉeĥaj oficistoj. Ni forlasas la patrujon.

Antipodaj sentoj movigas nian koron. Ĝojo kaj sopiro je nia infano alternas kun malĝojo kaj aflikto, nepriskribebla emocio. En la vagonaro aperas aŭstriaj konduktoj. Unu el ili diras: „Ĵus vi pasis la feran kurtenon!“

Venas aŭstria oficisto por kontroli pasportojn. Estos por vi interese aŭdi kion kaŭzis tiam esp. insigno (tiu kun flago ĉeĥoslovaka), kiun portis mia edzo sur sia surtuto. La oficisto, kiu konjektis, ke ĝi estas insigno de la partio, ekflamis kaj diris, ke ni devas tuj daŭrigi nian vojaĝon al Italio. Ni ne kontraŭparolis, nur ni rimarkis, ke ni en Vieno ankoraŭ demandos. Li respondis abrupte, ke ni ne estas ion demandotaj, sed ke ni devos forlasi Aŭstrion tuj, tujege.

Mia edzo ekdormas pro laciĝo – mi apogita sur lia brako silente ploras por ne vekti lin. Mi priploras Ĉeĥoslovakion, ĉion kaj ĉiujn karajn, kiujn mi forlasas.

Vespere ni atingis Vienon. Ni ne trovis tempon anonci nin ĉe vienaj esperantistoj. Ni devis esti atendataj de hebrea institucio en la stacidomo, sed pro ia miskompreno neniu estis tie. Nun ni staris en la stacidomo, meze de niaj valizoj, sen monero. Kion fari? Ni interkonsiliĝas, iu ĉeĥo helpas nin, ni vokas israelan konsulejon kaj de post tiu momento ni estas komplete kaj brile prizorgitaj.

Oni forkondukas nin en belan hotelon kun ordono plenumi ĉiujn niajn dezirojn.

Matene venas aŭto por veturigi nin en la konsulejon. Ni ricevas po 100 ŝilingoj por niaj malgrandaj elspezoj. Ni trovas niajn amikojn, pasigas kun ili la tagon. Ili gvidas nin tra Vieno. Ni admiras

grandan trafikon en la urbo, belajn konstruaĵojn kaj relative malaltajn prezojn de ĉio. Por niaj 100 ŝilingoj ni povus aĉeti diversajn, sed ni ne povas. Ĉie estis fermite – estas dimanĉo.

Ni adiaŭas Vienon vespere, tra neĝokovritaj Alpoj ni venas tra Udine al Venezia, kie ni haltas sufiĉe longe. La loko, pri kiu mi revis jam ekde mia infaneco. Poste Padova, Verona, Milano, famaj urboj, ĝis nun konataj al mi nur el libroj.

Ne estas priskribebla la lukso, kiun ni ĉie renkontas. Ni neniam sciis, ke ekzistas tiel brilaj elektraĵoj, tiel belegaj aŭtoj, tiel vestitaj homoj, virinoj kun tiom da juveloj. Tamen ni konfesas, ke ni vidis ankaŭ strikantajn laboristojn. En Ĉeĥoslovakio laboristoj ne strikas. De tie ni venis el Genova, kie ni restis du tagojn. Genova estas antikvega urbo, plena de interesaj. Ni sentas nin kvazaŭ en alia mondo. Strange impresas inter la belaj palacoj ŝnuroj plenaj de sekiĝanta tolaĵo.



Antaŭ nia fenestro staras monumento de Kolumbo¹, kies naskiĝdomon ni ankaŭ vidis. Krom tio altegajn kaj belajn nubskrapantojn. Tra la urbo kondukis nin esperantistoj, vespere ni partoprenis kunvenon de la klubo. Apud mi sidis delegito de Nairobi en Kenjo, kiu venis kun sia familio viziti Eŭropon. Li rakontis, ke antaŭ proksimume 20 jaroj li estis en Praha, kie li konatiĝis kun esperantisto portanta la nomon Ginz.

1 Foto de Kolumbo-monumento el la itala Vikipedio

Vi povas imagi la surprizon kaj la aplaŭdon de samideanoj, kiam la du malnovaj amikoj ĉirkaŭbrakiĝis. Stranga hazardo, ĉu ne? Mia edzo parolis pri Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio kaj ankaŭ mi aldonis kelkajn vortojn. Poste ni enŝipiĝis en belan blankan ŝipegon kun nomo „Jerusalem“, kiu nin transportis al Marseille.



Panoramo de Marsejlo (el Vikipedio)

Tie ni restis unu kompletan tagon. Estis nia sola halto en Francio. Ni observas vivon en la haveno, el ventro de nia ŝipo oni malŝarĝas novajn kaj novajn kestojn da izraelaj oranĝoj, dume ŝarĝas terpomojn, aŭtomobilajn partojn ktp.

De tie ni veturis jam rekte Israelon. La ŝipo estas belega kaj relative granda. 320 homoj laboras tie kaj da pasaĝeroj estas 1500. La personaro, de la kapitano ĝis lasta servisto, estas hebreoj kaj parolas hebrean lingvon. Estas utilege por ni, ke ni ĝin lernis. Estas ĉi tie hebreoj el ĉiuj mondpartoj kaj feliĉe ankaŭ multaj el ili konas la lingvon. Krome oni aŭdas ĉi tie plej diversajn lingvojn, eble ĉiujn eŭropajn, arabajn kaj aliajn. Kunveturas afrikaj hebreoj inter ili iuj kun majestaj blankaj barboj en blankaj manteloj kun kapuĉoj (laŭ araba maniero), sed laŭ

vizaĝoj aspektantaj kiel veraj bibliaj profetoj.

La maro estas relative maltrankvila, ŝanĝas sian koloron, jen estas griza, jen verda kaj denove blua. Survoje ni vidis unuflanke Korsikon, aliflanke Sardinion, poste sur maldekstra flanko Apeninan duoninsulon, sur la dekstra flanko Sicilion kun Messina kaj Calabria. Impresis nin la altegaj feraj mastoj, transportantaj elektran kurenton de la itala kontinento al Sicilio. Neniam ni aŭdis pri tiuj ĉi grandiozaj laboroj. La mara horizonto leviĝas kaj iras denove malsupren. Kun ĝi ankaŭ nia stomako – tamen, kredo, ke ni ĝis nun ne nutris la fiŝojn. Da ili estas verŝajne sufiĉe en la maro, ĉar ni ofte jam renkontis fiŝistajn barkojn, kaj ankaŭ svarmoj da flugantaj fiŝoj flugadas preter nia ferdeko.

Ankaŭ Grekujon (la insulon Kreta kun neĝokovritaj montopintoj) ni vidis, sed tio ŝajne estas la lasta tero, kiun ni renkontis. Ni ne scias, ĉu ni vidos Cipron, sed certe estas, ke ni jam morgaŭ estos en Haifa, celo de nia vojaĝo.

Ni ambaŭ vin ĉiujn plej kore salutas – viaj M. Ginzová, O. Ginz.

P.S. Ni en ordo alvenis kaj estas jam kune kun niaj infanoj feliĉaj kaj kontentaj.



La nuntempa Haifo (el Vikipedio)

**Výsledek hospodaření ČES za rok 2017, plán na rok 2018
a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).**

Příjmy	rok 2017	plán 2018	Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2017	
Příspěvky na běžný rok	17 910	19 000	peněžní prostředky	
Příspěvky dobrovolné	500	1 000	pokladna korunová	157
Příspěvky na budoucí rok	24 809	25 000	pokladna eurová	0
Dary členů	35 741	10 000	ceniny	2 747
Dary nečlenů	2 000	2 000	účet Fio	100
Dotace	10 000	10 000	účet Fio spořicí	461 210
Starto předplatné	848	1 000	peníze celkem	464 214
Konference a sjezdy	71 024	70 000	<i>změna vůči 31.12.2016</i>	22 360
Činnost klubů a sekcí bez PS	0	2 000	investice	
Muzeum	0	0	podílové listy	187 137
Libroservo	31 291	4 000	investice celkem	187 137
Kurzy esperanta	810	4 000	<i>změna vůči 31.12.2016</i>	-2 872
Příspěvky UEA ind. běžný rok	16 695	5 000	pohledávky	
Příspěvky UEA ind. budoucí rok	20 100	12 000	UEA subkonto	13 220
Platby UK na běžný rok	0	5 100		
Platby UK na budoucí rok	48 664	40 000		
Platby ILEI a pedagog. komise	1 200	900	pohledávky celkem	13 220
Úroky z účtů	222	200	<i>změna vůči 31.12.2016</i>	-17 353
Virtuální adresa	0	200	ostatní majetek ČES	
			drobný majetek v ceně pořízení	193 706
			knihy v libroservu (odhad)	21 857
Příjmy celkem	281 814	211 400	ostatní majetek ČES celkem	215 563
			<i>změna vůči 31.12.2016</i>	29 745
Výdaje	rok 2017	plán 2018	závazky	
Starto tisk	19 604	20 000	platby pro UEA	2 880
Starto distribuce	15 461	16 000	klub Brno	4 240
Konference a sjezdy	63 054	70 000		
Činnost klubů a sekcí bez PS	5 960	5 000	závazky celkem	7 120
Administrativa, kancel. pořeby	2 233	2 500	<i>změna vůči 31.12.2016</i>	-2 815
Jízdné funkcionáři	0	5 000	účelově vázané prostředky	
Přísp. na stravné za schůze	300	700	fond Tilio	27 392
Muzeum	24 886	25 000	fond ediční	12 660
Libroservo nákup zboží	27 560	4 000	fond Cigno	25 197
Libroservo poštovné a balné	0	600	sekce nevidomých	20 279
Kurzy esperanta	337	200	klub Mladá Boleslav	16 221
Příspěvky UEA ind. běžný rok	16 695	8 000	klub Ratíškovice	8 246
Příspěvky UEA ind. budoucí rok	20 100	12 000	klub Karlovy Vary	7 697
Platby UK v běžném roce	0	5 100	pedagogická komise	5 116
Platby UK na budoucí rok	48 664	40 000	klub Havířov	2 542
Platby ILEI a pedagog. komise	811	800	klub Písek	2 433
Kolektivní členství v UEA	146	1 000	ost. kluby a sekce bez pr. os.	10 094
Kolektivní členství v EEU	1 351	1 300	celkem	137 877
Blahopřání, kondolence	1 402	1 000	<i>změna vůči 31.12.2016</i>	-2 718
Poplatky	0	50		
			Pozn:	
Daň z úroku	42	50	byl pořízen počítač, myš, lankový zámeček,	
Nový majetek	33 476	16 000	brašna, licence Office 2016, NAS s wifi	
Závazky k sam. klubům	0	4 200	adaptérem, wifi kamera, inkoustová	
			multifunkce s wifi, věšák do muzea,	
Ceniny		1 000	v celkové hodnotě 33476 Kč	
Výdaje celkem	282 082	238 500		

Pavel Polnický 75-jara

La 10-an de aprilo 2018 festos nia honora membro gravan vivjubileon. Iama asocia sekretario, poste aktivo de KELI, prizorganto de la gazeto Dia Regno kaj aranĝanto de pluraj KELI-kongresoj estis honorita ankaŭ de sia urbo.



La 2-an de marto 2018 en plenplena teatro estis festata **Tago de Poděbrady**, fama banurbo por kuracado de kormal-sanoj. Konferis Petr Vichnar kaj Leona Machálková. Enkadre de la programo estis honorigitaj kelkaj civitanoj, inter ili ankaŭ esperantisto **Pavel Polnický**.



Por la longtempa meritplena laboro en la Kristana Esperantista Ligo Internacia okaze de lia vivjubileo. Tiel tekstas la traduko de la honorigo.

Alfons Kremel (1891-1955)

Forgesita meritulo

Ciferecigante Pacdefendanton 43/1955 ni trovis nekrologon pri forgesita esperantisto:



En la urbo Bohumín mortis meritplena prezidanto de la loka E-rondeto k-do **Alfons Kremel**.

Ankoraŭ kun aliaj samideanoj li meritas la konstruon de Esp-monumento en la urba parko en la jaro 1934. Ĉi monumenton perforte forigis germ. faŝistoj dum nazia invado en 1939. Post la liberigo en 1947 estis dank' al k-do Kremel konstruita monumento tute nova. En 1953, laŭ deziro de la urba konsilantaro, estis la monumento translokita al pli taŭga loko. Tiam laŭ informoj, la financajn elspezojn plejparte kovris denove k-do Kremel.

Kiam prezidanto de la grupo ĉesis labori kaj flankiĝis, Kremel fariĝis lia anstataŭulo kaj kun malgranda grupo de oferemaj gek-doj, Trombala, Razska ktp, li daŭrigis la batalon por nia afero en urbo Bohumín de regiono Ostrava.

K-do. Kremel ege deziris ĉeesti nian TUTŜTATAN en Otrokovice, sed bedaŭrinde subita malsaniĝo ordonis lin al hospitalo (peritoneiton kaj ventroakvo), kie li post operacio subite mortis en aĝo 64 jaroj.

Ĉe la funebra ceremonio, kiu okazis 14-an de julio, multaj konstatis lian oferemon kaj aktivecon por Esperanto kaj mondopaco. Super la tombo kun li adiaŭis k-do Fr. Lička kaj Vladimír Slaný el Ostrava en la nomo de nia granda esperantista familio.

Pomo ne falas malproksimen de la pomujo

Ne nur ni, ĉefaj esperantistoj, sed ankaŭ multaj aliaj en la tuta mondo bone rememoras ĉiam gajan kaj tamen rilate al akceptitaj taskoj seriozan operkantiston kaj honoran membron de ĈEA Miroslavon Smyčka. Li en la jaro 2016 ankoraŭ festis sursceneje sian naŭdekjariĝon. Tie krom li kantis liaomaĝe ankaŭ la edzo de lia filino Jolana, operkantisto de la praga Nacia teatro Richard Haan, sed ni povis ĝui ankaŭ dueton en Esperanto plenumitan de Mirek kun Jolana. Bedaŭrinde, en la sekva jaro ni devis adiaŭi Miroslavon por ĉiam. Sed la filino de Mirek, Jolana Haan Smyčková, iras feliĉe en la spuroj de sia patro. Ŝi, kantistino kaj aktorino, apartenas al la kerna skipo de la praga teatro *Semafor*, apud Jiří Suchý, Jitka Molavcová, Jiří Štědroň kaj aliaj.



Invitite de Jolana, ni esperantistoj – amikoj de ŝia patro – povis spekti en novembro la muzik-komedion de Jiří Suchý *Zlomené srdce lady Pamelý* (La rompita koro de damo Pamela), en kiu ŝi plenumis la ĉefan rolon. La prezentadon antaŭis komuna vizito de la tombo de Mirek kaj omaĝo al li en la teatra klubo.

Sed la ĉefa okazaĵo, kiun mi volas menci, estis vere neatendita surprizo: Mi kun mia koramikino Milada vizitis la Kristnaskan programon *Vánoce v Semaforu* (Kristnasko en Semafor'). Kvankam Jolana antaŭavertis min, ke mi estos surprizita, mi tute ne povis imagi, per kio.



Kaj ho! En unu parto de la programo la kantistoj prezentis diverslingvajn kristnaskajn karolojn, ĉiam tenante antaŭ si flagon de la ŝtato, kie oni parolas la koncernan lingvon. Inter ili ankaŭ Jolana kun la flago de Germanio kantis germane la faman *Stille Nacht* (Paca nokt'). Kiel la lasta ekaperis denove Jolana kun Esperanto-flago enmane kaj demandis la „ĉefon“ Jiří Suchý, ĉu ŝi rajtas prezenti ankaŭ karolon en Esperanto. Dum ilia mallonga amuza konversacio li ne nur konsentis, sed eĉ konfesis, ke kiel junulo li ses semajnojn lernis Esperanton. Kaj do en la fama praga teatro Semafor' sonis en Esperanto forte aplaŭdota lulkanto, ofte kantata kiel karolo „*Dormu, ho, mia prinĉet!*“ en traduko de Jiří Kořínek plenumata de Jolana. Ĉar „Kristnasko en Semafor“ estis prezentita naŭfoje, do naŭfoje la publiko en komplete disven-

dita teatro aŭdis interesan dialogon pri Esperanto kaj ĝuis Esperantan karolon. Certe tre konvena maniero kiel prezenti Esperanton.

Sed tio ne estis ununura surprizo! Fine de la prezentado de tiu kristnaska programo ekaperis inter la aktoroj kaj kantistoj eĉ anĝelo, kiun vi povas vidi sur la foto. Kaj menciindas, ke ankaŭ ties plenumanto apartenas al la posteularo de Mirek Smyčka: Temas pri lia nepo kaj pli juna filo de Jolana, Kristián.

Gratulon, Jolana, kaj dankon!



Tio povus esti fino de la artikoleto. Sed mi volas aldoni ankoraŭ mian esperon, ke Jolana iru plu en la spuroj de sia paĉjo ne nur en la kampo de kantado kaj moviĝado „sur la lignotabuloj, kiuj signifas la mondon“, sed ankaŭ rilate Esperanton. La bazon ŝi posedas: La Esperanto-medion ŝi ekkonis danke al sia paĉjo jam kiel infano en la Esperanto-tendaro Lančov kaj lernolibron de Esperanto ŝi ankaŭ posedas. Ĝojiga novaĵo estas, ke ŝi mem proponis kanti en Esperanto ene de la Esperanto-meso en Prago la 28-an de februaro. Kaj ne nur ŝi kantos tie! Ŝia edzo Richard Haan prezentos tie Bibliajn kantojn de A. Dvořák.

Teksto: Petro Chrdle
Fotoj Dušan Dostál

Grava esperantologia verko

Kiel la unuan verkon en la jaro 2018 la eldonejo KAVA-PECH aperigis unikan esperantologian verkon *Aliroj al Esperanto*. La ĉefredaktoro Christer Kiselman kune kun la redaktoroj Renato Corsetti kaj Probal Dasgupta prezentas sintenojn de la plej pintaj esperantologoj rilate iliajn alpaŝojn al Esperanto, ĉiu el sia esplorkampo.

Post la antaŭparolo el la plumo de la ĉefredaktoro temas pri jenaj kontribuajoj: *Pacisma aliro* de Javier Alcalde, *Interlingvistika aliro* de Detlev Blanke, *Jursciencia aliro* de Cyril Brosch, *Du problemoj en la sintakso de Esperanto* de Probal Dasgupta, *Esperanto el frazeologia vidpunkto* de Sabine Fiedler, *Malantaŭ la kurteno: Esperanto kiel lingvo-inventaĵo* de Federico Gobbo, *Lingvoideologia aliro: Ĉu Esperanto vere havas “internan ideon”?* de Kimura Goro Christoph, *Tipologia karakterizo de esperanto kiel natura lingvo* de Ilona Koutny, *Kvantaj aliroj* de Haitao Liu, *Aliro tra la literaturo* de Carlo Minnaja, *Rezigno pri libereco ne ĉie kaj ne ĉiam: la vortordo en Esperanto* de Hiroshi Nagata kaj Renato Corsetti, *Hedonisma aliro* de Orlando E. Raola, *La du epistoloj de Odeso* de Giorgio Silfer kaj *Historia aliro* de Humphrey Tonkin.

La verko havas 229 paĝojn je grandeco 15,5 x 23,5 cm kaj kostas 16,50 €, tamen por la membroj de ĈEA validas la rabatita prezo 190 Kč.

Petro Chrdle



La teatro-ensemblo DOMA en Seulo

La 25a de julio 2017 enskribiĝis en historion de la Svitavy-teatro-ensemblo, gvidata de Radka Oblouková, kiel la tago, kiu alprenis por la junaj teatro-aktoroj premieran prezenton sur la kontinento Azio. La menciita teatro-grupo DOMA reprezentis la urbon Svitavy kaj la tutan Ĉeĥan respublikon okaze de la Tutmonda Esperanto-Kongreso, kiu en 2017 okazis en la ĉefurbo de la Korea respubliko – Seulo. La reprezentantoj de nia Pardubice-regiono proponis al la simpatizantoj de la planlingvo - do Esperanto - la teatraĵon „El la vivo de insektoj“, kies aŭtoroj estas Josef kaj Karel Čapek.



Estas mencienda, ke centoj da partoprenantoj el diversaj „mondanguloj“ rekompencis la svitavajn teatro-ludantojn per forta aplaŭdo. Krom la menciitaj teatro-ludo-devoj havis niaj junaj prezentistoj ankaŭ eblojn viziti: la reĝo-palacon, budhanajn templojn aŭ fari turismo-turon en la Nacia natur-parko Bukhansan. La pli detalaj informoj pri la eksterlanda vojaĝo de nia teatro-grupo

estas por vi preparitaj enkadre de la teatro-vojaĝ-vespero, kiu okazos en la urba teatro Trám en Svitavy. La okazo de la menciita eksterlanda vojaĝo ne povus realiĝi sen subteno de la urbo Svitavy, de la Pardubice-regiona-organo kaj de aliaj sponsoroj. Al ĉiuj apartenas nia granda DANKO!

*Přemysl Dvořák,
regiona pres-organo.*



Kaj nun ni lasu paroli la reĝisorinon Radka Oblouková:

Docela Malé (DOMA) divadlo Svitavy, Česká republika

Ze života hmyzu (El la vivo de insektoj)
Aŭtoroj: Josef kaj Karel Čapek
Sceneja aranĝo, reĝio: Radka Oblouková
Traduko en Esperanton:
Josef Vondroušek, Miroslav Malovec

La teatro-grupo DOMA Svitavy ekzistas jam 23 jarojn (de la 1994). Tra tiu ĉi studenta ensemblo trairis dekoj da studentoj kaj junaj homoj, nur la estrino – reĝisorino estas la sama. La teatro-grupo DOMA elkreis dum la jaroj multajn teatraĵojn, de diversaj temoj, kaj

prezentis ilin sur multaj podioj de teatraj festivaloj – kaj ne nur en nia lando.



En la jaro 2012 ni unue studis la teatraĵon en Esperanto – ĝi estis R.U.R. de Karel Čapek. Ĝin povis spekti la partoprenantoj de la Universala Kongreso en Rejkjaviko, poste okaze de la Nacia kongreso en Italio. Por la Universala Kongreso en Nitro ni studis la „Ze života hmyzu“, kiun ni havis honoron prezenti en Seulo.



En Seulo ni ludis por cca 600-nombra aŭskultantaro (precipe el neeŭropaj landoj - da ĉeĥoj kaj slovakoj estis ja nemulte), kaj mi pensas, ke ni ĉiuj estis agordiĝintaj „sur la samaj kordoj“.

En Koreio ja sentiĝas la timo pro milito pli, do tial oni rezonis kun la temo de teatraĵo. La urbego Seulo situas nur cca 50 km de la limo kun la Norda Koreio,

kaj dum nia vetur-agado ni eĉ pliproksimiĝis al la limo. La koreanoj kondukis tre agrable rilate nin, ni eĉ ligis kontaktojn kun esperantistoj el Koreio kaj el aliaj landoj. Dum la prezento ili nin rekte filmis por la esperanta elsendo, kaj mi opinias, ke kun pozitiva reeĥo. Poste kun ni sin fotis gravaj esperantaj funkciuloj.

Margit Turková



Sceno el la teatraĵo kaj afiŝo

JUNULARO

Centrejo (renkontiĝo) de nia junularo okazos en Žďár nad Sázavou (27.4.-1.5.2018) en la pentrinda regiono de Vysočina (Montetaro).

TEJO-kongreso en Slovakio

La 31-an de decembro 2017 en la pola Szczecin renkontiĝis komitato de TEJO, kies prezidanto Enric Baltasar ĉiujn surprizis per sia demisio. Kiel nova junulara prezidanto estis elektita 25-jara vjetnama junulino Hoan Tran Thi (Ĝojo). Dum reta januara kunsido de la TEJO-komitato oni balotis, ĉu la venontjara TEJO-kongreso 2019 okazos en Nederlando aŭ Slovakio. La komitato elektis Liptovský Hrádok en Slovakio.

Laŭ Libera Folio

UEA

Senpage vi povas elŝuti la januaran numeron de la **revuo Esperanto 2018/1**, iru al <http://revuoesperanto.org/> kaj legu ankaŭ aliajn novaĵojn pri la movado.

Aleks Kadar nova ĝenerala sekretario de UEA

Post demisio de Veronika Poór estis komisiita Martin Schäffer plenumi provizore la funkcion, en februaro 2018 estis elektita por tiu funkcio Aleks Kadar, 42-jara franca esperantisto. Li estros Centran Oficejon de UEA en Roterdamo. Pliajn informojn vi trovos en Vikipedio kaj Libera Folio

Al Esperanto mankas kleriga literaturo

Lingvoj servas ne nur por komunikado kaj amuzado, sed ankaŭ por informado kaj klerigado. Ni ne povas atendi, ke miliardoj da homoj lernos lingvon, en kiu eblas ŝerce babili pri negravaj aferoj, sed en kiu ne eblas serioze studi profesiojn, diskuti pri fakaj aferoj nek trovi enciklopediajn informojn pri la universo, naturo, historio.

En Esperantujo mankas ĉefe konscio pri la graveco de tia literaturo. Multaj homoj, kiuj lernis Esperanton, forkuras el nia movado, kiam ili konstatas, ke la lingvo posedas relative riĉan beletron kaj kulturajn festivalojn, sed tute sensignifan kaj malaktualan fakan literaturon, same malforta estas Esperanto kiel fonto de informoj.

Milionoj da homoj ĉiutage serĉas per Guglo diversajn informojn kaj trovas ilin aŭ en sia gepatra aŭ en la angla. Se la informoj estus troveblaj ankaŭ en Esperanto, la lingvo iĝus por la serĉantoj interesa kaj grava, sendepende de kvanto da parolantoj.

Neniu bezonas paroli kun miliono da homoj, eĉ ne en sia gepatra lingvo, sed ĉiu meznivele klera homo bezonas havi je sia dispono milionojn da informoj.

Plie estas multe pli facile krei kaj enretigi informojn, ol konvinki homojn lerni lingvon, en kiu informoj mankas.

Similan literaturon en niaj naciaj lingvoj kreis nur centoj, maksimume miloj da homoj, sed homoj konsciaj, ke tia literaturo estas por ĉiu lingvo necesa. Tiom pli por la lingvo internacia.

Miroslav Malovec

Rekonstrukce Muzea esperanta ve Svitavách



Protože v Muzeu esperanta se loupala omítka na jedné stěně pod výstavními rámy a v poslední době zatekla i voda z horního sálu, rozhodlo se město provést stavební úpravy. Práce započaly již koncem minulého roku. Odpadní jímka, která byla považována za zdroj vlhkosti, byla zrušena a objekt byl napojen na hloubkovou kanalizaci města.



V poslední dnech roku zajistil místní esperantský klub s pomocí esperantistů z České Třebové vyklizení Muzea esperanta. Vlhké zdivo bylo otlučeno, špatné omítky sundány. Bylo rozhodnuto, že spodní část stěny za obložením zůstane obnažena a vytvoří se větrací mezera mezi obložením a stěnou. Členové klubu využili těchto stavebních prací a požádali o povolení zřídit přímo v muzeu malou kuchyňku. Žádosti bylo vyhověno. Proto k úpravám stěn přibyla i práce s přípojkou pitné vody a s odkanalizování. Byly provedeny nové malby, při mytí byly doplněny žárovky do všech lustrů.

Dne 16. února členové klubu dokončili úklid a nastěhovali zpět nábytek. Členové místního klubu zde dosud odpracovali 180 brigádnických hodin, členové klubu z České Třebové 30 hodin. Již 18. února jsme uvítali první návštěvu a 22. února se zde konala opět cestovatelská přednáška.

Libuše Dvořáková

Rekonstruado de Esperanto-Muzeo en Svitavy

Unu muro en la muzeo estis humida, pecetoj de la stuko forfaladis, la akvo penetris eĉ de la supra salono. Tial la urbestro decidis ripari le difekton. La laboroj komenciĝis fine de la pasinta jaro. La klubanoj de Svitavy kaj de la proksima Česká Třebová forportis muzeajn materialojn, la membraron kovris per plasta foliego. Kiel novaĵo estis kreita eta kuirejo, oni lavis elektrajn lampojn kaj denove kolorigis la murojn.

La 16-an de februaro 2018 la klubanoj ĉion ordigis kaj la 22-an de februaro okazis la unua prelego pri interesa vojaĝo.

22-a Ekumena Esperanto-Kongreso

Antaŭ 50 jaroj (25. 7. - 1. 8. 1968) okazis en germana urbo Limburk/Lahn **1-a Ekumena Esperanto-Kongreso**, kiun mi almenaŭ kelktage povis partopreni. Ĉi-jare mi estas organizanto de la **22-a EEK en Poděbrady**, kiu okazos 6. - 13. 8. 2018. Aliĝis 64 personoj el 12 eŭropaj landoj kaj Japanio. El nia lando aliĝis nur 11 personoj kaj mi esperas, ke nombro altiĝos, se ankaŭ vi partoprenos.



foto: Vikipedio

Preparita estas riĉa programo, diservoj kaj mesoj, preĝoj, kantado, interesaj prelegoj, kultura programo kaj ekskursoj....

Partopreni povas ĉiu esperantisto, kiu volas travivi semajnon en kristana medio. Tute ne gravas, se vi ne estas kredanta homo. Pliajn informojn ĉe:

Pavel Polnický, Lidická 939/11, 29001

Poděbrady, tel. 723 672 335, rete:

polnickypavel@seznam.cz Aliĝilon vi

trovos: www.esperanto.cz



Agrikultura
mezlernejo
nia kongresejo

Seminaria laboro pri Esperanto-Muzeo en Svitavy

Nuntempe studentino de Gimnazio en Ústí nad Orlicí Štěpánka Nováková prilaboras seminarian laboron kun la temo: Esperanto-Muzeo en Svitavy el la vidpunkto de merkatico. La temon rekomendis ŝia profesoro, s-ro Brdíčko, kiu antaŭ 12 jaroj interesiĝis pri Esperanto, sed fine li donis preferon al la hebrea. Dum nia konferenco en Litomyšl li ĉiĉeronis tra la urbo por unu nia grupo.



Štěpánka Nováková en nia muzeo kolektas informojn por sia seminaria laboro.

Libuše Dvořáková

AnkRo en Písek

La tradicia aranĝo okazis la 9-an de decembro kaj krom la membroj de "La Ponto" partoprenis ĝin ankaŭ gastoj el EK Benešov, Obořiště, Pacov, T. Sviný kaj Vodňany. La Adventa matineo, destinita ankaŭ por la publiko kaj vizitita denove de la ĵurnalistoj, realiĝis kiel kutime en la klubejo de la Urba Biblioteko.



Estis pretigita ne nur eta ekspozicio pri Esperanta kaj kristnaska literaturo, sed ĉi-foje ankaŭ grandigitaj kristnaskaj filatelaĵoj el la mondo, kiuj sekve estis prezentitaj kaj ĝis 6.1. kreis propagandon por Esperanto en la biblioteka enirhalo.



El la bunta programo estu menciita almenaŭ rakonto pri la vivhistorio de František V. Lorenc (naskiĝinta ĝuste dum Kristnasko), kies librobiografio estis inter la 4 librodonaĵoj de la klubo al la biblioteko. Apartan prezenton pri sia libro faris M. Turková. La aranĝon

partoprenis ankaŭ M. Švejcárová, edzino de la forpasinta konata pentristo Václav Švejcar, favorinto de la ideo de Esperanto. La ĉeestantoj kantis ĉi-foje ne nur Esperante, sed ankaŭ en la hungara.



La posttagmeza parto kun tradicia alportado de lumo, legado el la biblio, kantado, tombolo, fabelo (en prezento de J. Malá) kaj meditado (ĉi-foje kun saĝaĵoj de Komenio) okazis post kvin jaroj ne en la paroĥa eksĉevalejo, sed en kameretosa medio de la Studenta hejmo Petrinum, kie nun loĝas la pastro Josef Kobza.



Dankon al ĉiuj, kiuj kunkreis agrablan etoson.

Pavla Dvořáková

Ekspozicio en Hodonín

Ĉu Esperanto estas morta lingvo?

8.2. – 4.3.2018

La ekspozicio kun entute 23 paneloj estiĝis en marto 2010 en Písek kaj en februaro 2011 fariĝis migra. Ĝis nun gastigis ĝin 37 institucioj en 32 urboj de 12 regionoj de la tuta Ĉeĥio. Post pli ol dujara organiza paŭzo dume la lasta gastiganto fariĝis la BANLOKO HODONÍN (Měšťanská 140), en kiu okazis la solena inaŭguro kun projekciado la 8-an de februaro. La realigon instigis kaj ĉefprizorgis Josef Vojáček el EK Brno, kun helpo de Jana Melichárková, estrino de la rondeto en Ratíškovice. La aranĝon partoprenis kaj la gastoj, kaj la esperantistoj el la ĉirkaŭaĵo. La ekspozicion en la banloka oranĝerio eblas senpage viziti iam ajn, la ŝlosilon bv. peti en la akceptejo. La viziton eblas ligi kun banado en la varmakva akvoparko.




La celo de la aranĝo estas viziti ĉiujn regionojn, do minimume ankoraŭ Hradec Králové kaj Pragon. La aktualajn informojn sekvu en la [Kalendaro](#) en Esperanto.cz

*Pavla Dvořáková, aŭtorino
kaj kunordigantino de la projekto*

Nia diligenta kolegaro

Gorecka, Halina; Korĵenkov, Aleksander. *Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj.* — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2018. — 320 p., il.; 500 ekz. — (Serio *Scio*, №10).



La aŭtoroj klarigas en la antaŭparolo, ke ili volis prezenti ĉiujn biografiojn en la sama stilo kaj amplekso, dum la klasika enciklopedio el la jaro 1935 estis kompilita el kontribuoj longaj kaj mallongaj, detalaj kaj koncizaj, de diversaj aŭtoroj kompetentaj kaj nemulte kompetentaj.

Kompreneble nin interesas, kiuj niaj esperantistoj estis envicigitaj. El la ĉeĥaj Ĉejka, Kamarýt, Lorenc, Pič kaj Urbanová, el la slovakaj Baláž, Marček kaj Zvara. Iomete surprizas, ke tie mankas Schulhof, Lukáš, Hromada, Sklenčka, Pumpr, Ginz, Kořínek, Dolinský, Rosa, Tvarožek k.a.

Sed ni povas ĝoji, ke tie ne mankas la plej gravaj eminentuloj de nia tutmonda movado, Zamenhof, Grabowski, Kabe, Baghy, Kalocsay, Waringhien, Privat, Lapenna, Rossetti, Auld, Piron, Boulton kaj aliaj, kiujn la aŭtoroj elektis.

Ĉiu el ni do povas kleriĝi pri nia movado pli facile ol per la malnova enciklopedio, kiu enhavas 2600 artikolojn. Se oni aktualigus ĝin per novaĵoj de la lastaj 80 jaroj, la enciklopedio enhavus minimume 5000 artikolojn, kiujn ne eblus ellerni. *Nia diligenta kolegaro* prezentas, kion ni ĉiuj devus koni.

Ĉe UEA ĝi kostas 30 eŭrojn.

Miroslav Malovec

Esperanto-kurso de Teo kaj Amo

en Nový Jičín finiĝis. Ni finis kurson per rekta elsendo en facebook kaj youtube rekte el nia lernejo per transdono de diplomoj.



Al la kurso aliĝis 17 personoj kaj kurson finis 10 personoj. 8 personoj akceptis la diplomon, ĉar kondiĉo por atingi la diplomon estis 66 procenta partopreno. Gratulon al ĉiuj partoprenantoj de la kurso, al ĉiuj instruistoj kaj dankon al kulturcentro de Nový Jičín, al kiu apartenas biblioteko, kie ni lernis Esperanton. Rektan elsendon vi povas spekti tie:

www.youtube.com/watch?v=dhJdZld8qlA

Amike Paŭlo kaj Rosto Verda Stacio

TER 2018

Tutslovakia Esperanto-Renkontiĝo okazos 11. – 13. de majo 2018 en Levice. Bonvolu klaki al tiu ĉi adreso:

<http://ter.esperanto.sk>

La renkontiĝo omaĝos 100 jarojn de Ĉeĥoslovakio.

VEDEM flugos en la kosmon

La 21-an de marto 2018 flugos en la kosmon usona astronauto Andrew Feustel, kies edzino estas ĉeĥdevena. Feustel jam portis en la kosmon poemojn de Jan Neruda *Kosmaj kantoj* kaj figuron de Talpo, nun li elektis kopiojn de la gazeto VEDEM, kiun sekrete eldonadis infanoj en Terezín sub redakto de Petr Ginz, filo de esperantistoj Ota kaj Maria Ginz. Feustel volas omaĝi ankaŭ al la israela astronauto Ilan Ramon, kiu en 2003 kunprenis al la kosmo bildon de Petr Ginz, sed ilia kosmopramo Columbia dum reveno forbrulis (1.2.2003).

KAEST 2018

18-21 de oktobro 2018 Modra-Harmónia
Temo: **Evoluo de paradigmoj en scienco kaj tekniko**

Paradigmo estas modelo de konjugacio

(*amas, amis, amos, amus, amu*) aŭ deklinacio (*patro, patron, patroj, patrojn*) en la gramatiko aŭ de pensmaniero en konkreta scienco aŭ tekniko (*fiziko de Newton kaj fiziko de Einstein*). En Modra atendas vin praktika trejnado, vingustumado, ekskurso, seminario Erasmus, fakaj kunsidoj kaj kompreneble prelegoj. Vidu:




kie vi trovos pliajn informojn.


<http://kaest2018.ikso.net/>

Urboj de Teo kaj Amo

En ĉi-jara januaro atingis la urbojn Svitavy kaj Nový Jičín libroj titolitaj „Amo kaj teo“. La libron kun pli ol 320 paĝoj verkis kaj riĉigis per fotoj redaktoro de la ĉina radiostacio CRI Ĝoja (Zhang Pink).



Ĝi pritraktas teon ĝenerale, festivalon de mallongaj filmoj kaj ankaŭ urbojn, kiuj estis elektitaj kiel urboj de Teo kaj Amo. Inter 5 urboj de la mondo estis elektitaj ankaŭ 2 ĉeĥaj - Svitavy kaj Nový Jičín. Svitavy partoprenis la konkurson de mallongaj filmoj unuafoje en 2015. La tuta scenaro de tiu filmo estas citita en la libro. Ĝoja ankaŭ priskribas, kiamaniere ŝi unuafoje eksciis pri Svitavy. Al nia urbo ŝi dediĉis 12 paĝojn eĉ kun fotoj. La saman kvanton ŝi dediĉis ankaŭ al Nový Jičín, kiun reprezentis Pavol Kaščák kaj Rostislav Čubok, kiuj jam estas membroj de la klubo en Svitavy.



OktoBRE 2017 ili transprenis en la festivalo diplomojn por ambaŭ urboj. La honorigo por la urbo Svitavy estos transdonita al la urbestro de Svitavy dum festado de la 85-a datreveno de la klubo.

Libuše Dvořáková

Post la rekonstruo



Dum la rekonstruado de nia muzeo estis farita eta kuirejo malantaŭ la ŝranko kun vendeblaj libroj de Libroservo. Estas tie fluanta akvo taŭga por trinkado same kiel por lavado de tasoĵ. Ne plu necesos preni akvon en la necesejo, kiam oni volas prepari teon aŭ kafon kaj post trinkado lavi la tasoĵn. Nur la biblioteko perdos kelkajn bretojn por siaj libroj kaj gazetoĵ.

Membrokunveno de Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy

okazis sabate la 10-an de februaro 2018. Ĉar la Esperantomuzeo estas nun rekonstruata kaj ne funkcias, la kunveno realiĝis en la 3-a elementa lernejo. Kolektiĝis 11 membroj el 16 kaj alveturis ankaŭ 6 gastoj. Oni balotis pri la estraro kaj estis reelektita la ĝisnuna komitato. La kluba prezidantino Libuše Dvořáková prezentis raporton pri la agado de la klubo dum la pasinta jaro. En 2017 la klubo organizis 32 aranĝojn, kiuj daŭris sume 58 tagojn. Plej malfacila finance kaj organize estis unusemajna Internacia Renkontiĝo en Svitavy. La membroj partoprenis ankoraŭ 7 aliajn aranĝojn, inter ili ankaŭ Universalan Kongreson de Esperanto en Seulo kaj Filmfestivalon en Ĉinio.



Same klopoda estos la nuna jaro, ĉar la klubo festos 85 jarojn de sia ekzisto kaj Esperantomuzeo rememoros sian 10-jaran jubileon. Kaj plej klopoda estos la komenco de la jaro, ĉar post la rekonstruado necesos purigi la muzeon kaj enporti reen la forportitajn objektojn. Ni kredas, ke ĉio sukcesos laŭ niaj planoj.

Libuše Dvořáková

Jarkunveno en Brno



merkrede la 14-an de februaro 2018 konstatis, ke en 2017 okazis 40 kunvenoj kun prelega kaj instrua programo, aperis kluba publikaĵo pri Miloš Lukáš, d-ro Fischer eldonis proprakoste libron pri skaraboj kaj al M. Malovec la eldonejo KAVA-PECH eldonis grandan vortaron. La klubaj prelegoj aperas en la kluba retejo.



La klubanoj partoprenis en diversaj enlandaj kaj eksterlandaj Esperanto-aranĝoj (Hodonín u Kunštátu, Lančov, Banská Štiavnica, Zöblitz, Svitavy, Kroměříž). La kluba biblioteko riĉiĝis per dudeko da libroj.

La klubanoj planas krei lernoludojn, enkomputiligadi malnovajn tekstojn, riĉigadi Memoron de la Movado kaj la ĉeĥan-Esperantan vortaron kaj prepari novajn 40 programojn en la klubejo.

mm

Občasník KAVA-PECH

V prosinci 2016 nakladatelství KAVA-PECH vydalo první občasník, ale od té doby jenom dva další. Rozešlal jsem ho jen lidem, o nichž jsem (snad oprávněně) předpokládal zájem, a mnozí z nich se skutečně zaregistrovali. Ale využívám i Starta k většímu rozšíření této informace.

Protože v žádném případě nechci spamovat, občasník dostanou pouze zaregistrovaní zájemci. Ti budou dostávat nepravidelně občasník s informacemi o nově vyšlých publikacích KAVA-PECH (českých i esperantských), o příležitostných slevách a současně po dobu registrace (kterou je možné kdykoliv zrušit) mají zajištěnou na všechny knihy objednané z webu www.kava-pech.cz trvalou slevu 10 %.

Občasník nebude vycházet nikdy častěji než čtyřikrát za rok, a nebude obsahovat přílohy. Zájemci si ho mohou objednat online na webu www.kava-pech.cz, ale také pomocí e-mailu na info@kava-pech.cz s uvedením svého jména a e-mailové adresy.

Nejbližší občasník plánujeme rozeslat v březnu, ale vyhlášené slevy budou platit minimálně jeden měsíc, takže při zaregistrování po vyjití tohoto čísla Starta bude už možnost čerpat nejen trvalou slevu 10 % na vše, ale zároveň i vyhlášené příležitostní slevy.

Petr Chrdle

Peto el Francio



Karaj samideanoj,


Mi nomiĝas Dominique Baron kaj loĝas en Tours, Francio. Mi instruas Esperanton en la kolegio, ene de la Instituto Notre-Dame La Riche, al 4 junaj knaboj. 3 havas 11 jarojn kaj 1 havas 13 jarojn. Ili estas komencantoj. Por ke ili sciu, ke Esperanto estas vere internacia, mi petas vin, se vi bonvolas, sendi al ili poŝtkarton de via lando. Tiamaniere, ankaŭ la tuta Instituto scios pri Esperanto. Alkroĉite, mi sendas al vi foton de la grupeto.

Jen la adreso:
Institution Notre Dame La Riche
à l'attention de Dominique BARON
30 rue Delpérier
B.P. 5813
37058 Tours Cedex 1
Francio

Antaŭdankon,
samideane via,

Dominique |||||

Amika invito



al tradicia
semajna
seminario en
Ĉeĥa paradizo,
en familian

pensionon **ESPERO** en vilaĝeto
SKOKOVY – 75 km nordoriente
de Prago – en puran naturon
de la 2-a majo ĝis 6-a majo 2018
inter homoj sanaj, handikapitaj,
junaj kaj maljunaj, kiuj ŝatas
Esperanton kaj deziras ĝui naturon.
Oni povas ekzerci korpon kaj
spiriton, krei mane memoraĵojn kaj
ion alian plu...babili, frandi,
promeni, ekskursi, diskuti, ludi, eĉ
lerni....

Senbara modesta medio, 2-5 litaj
ĉambroj, prezo 420 Kč/tago
(1 Eŭro 26 Kč) por kompleta servo
je unu tago. Necesejoj kaj duŝejoj en
koridoro. Interreta konekto. Oni
pagas surloke.

Kontaktoj: Jindřiška Drahotová,
Sadová 745/36, Mladá Boleslav
293 01

Tel: 420 720 652 320

drahotovaesperanto@seznam.cz

drahotova@esperanto.cz

www.sweb.cz/espero.skokovy

www.mlboleslav.cz/esperanto

www.evinatelier.cz

www.aeh@esperanto-aeh.eu

www.esperanto.cz

SET Lančov

Nia tradicia somera tendaro havas
novan modernan retejon.



Kursoj de Esperanto

La 2-a etapo 15.7.-28.7.2017

infanoj ĝis 15 jaroj 3 990 Kč
ceteraj 4 190 Kč

La 3-a etapo 29.7.-10.8.2018

infanoj ĝis 15 jaroj 3 870 Kč
ceteraj 4 070 Kč

Renkontiĝo de eksaj tendaranoj:

10.8.-12.8.2018

Kursoj de aliaj lingvoj

La 2-a etapo 15.7.-28.7.2017

infanoj ĝis 15 jaroj 4 290 Kč
ceteraj 4 490 Kč

La 3-a etapo 29.7.-10.8.2018

infanoj ĝis 15 jaroj 4 170 Kč
ceteraj 4 370 Kč

<https://www.set-lancov.cz/>



Tra la mondo

Ĉinio serĉas volontulojn

La Profesia kaj Teknika Kolegio Pingliang, kun 500 laborantoj kaj 6000 studentoj, intencas inviti du-kvar fremdajn volontulojn por instrui anglan lingvon kaj samtempe funkciigi Esperantan lecionon kiel la nedevigan programeron por interesitaj studentoj kaj instruistoj.

La kandidatoj devas bone regi Esperanton kaj anglan lingvon. La kolegio liveros al ĉiu volontulo senpagan loĝadon kaj monate 2000 RMB da honorario, kiu sufiĉas por pagi bonan manĝadon de minimume du homoj en la manĝejo de la Kolegio. La volontuloj povos volontuli semajnon ĝis 12 monatojn laŭ sia plaĉo. Al tiuj kiuj laboras pli ol 6 monatoj, la Kolegio repagos la koston de la dudi-rektaj vojaĝoj. Interesatoj kontaktu s-ron Trezoro Huang Yinbao trezoro@qq.com kaj s-ron Ardo esphugp@126.com. Skajpo: *huangyinbao*.

GREKAJ MITOJ en Esperanto

en traduko de Dorotea kaj Hans Georg Kaiser estas elŝuteblaj ĉe la reta adreso lurl.cz/Gt9zj. La tekstojn kontrolis Vladimír Türk, li ankaŭ ilin legas kune kun Jaroslava Malá kaj Jan Řepa, sed oni povas ilin legi mem en PDF, spegule en originalo kaj traduko. Oni trovas tie famajn rakontojn pri Prometeo, Oresto, Orfeo, Diluvo, Daidalo kaj Ikaro, Milito de Trojo ktp. en prezento de nia verkisto Eduard Petiška (1924-1987).

RETRADIO

En la pasinta numero de Starto mi informis pri la projekto Retradio de Anton Oberndorfer el Aŭstrio, sed enŝteliĝis eraro. Ĝusta estis informo, ke kontribuas ankaŭ Jaroslava Malá el Bavorov kun teknika subteno de Vladimir Türk el Netolice, sed la cititaj ekzemploj apartenis al aliaj aŭtoroj. Mi petas pardonon kaj mencias verajn kontribuojn de J. Malá: *Kiel detektivoj ĉasis magiiston, Ĉio, kion kato kapablas, Oresto, Ne tiom oro kiom salo valoras, Kiel reĝo katon aĉetis, Natria bikarbonato, Eroso kaj Psiĥo* ktp.

En 2018 ŝi jam sukcesis enmeti jenajn prelegojn: *Nova vivoŝanco por artefarita koro, La ateisto, Universitato de la tria aĝo, Ĉeĥoj dubas pri ĝenerala malpermeso de fumado, Pupoj por bona celo*.

Interesaj estas ankaŭ kontribuoj de aliaj aŭtoroj, pri kio vi povas konvinkiĝi ĉe la retejo

<http://members.aon.at/aldone/retradio/>

-mm-

Hans Moser pri Svitavy

La 22-an de januaro 2018 parolis Hans Moser en la Berlina Kulturcentrum Danzinger 50 pri internacia Esperanto-konferenco en Svitavy en septembro 2017.

<https://esperanto.berlin/moser-svitavy-2017/>

Vortaro de la jaro 2018

La ĉeĥa tradukista asocio honorigis novajn vortarojn. En la kategorio de la tradukaj nia granda Esperanto-vortaro okupis la trian lokon kune kun la hebrea:

www.jtpunion.org

Por muzik-ŝatantoj en Esperanto

De nun, ĉiuj eldonaĵoj en ĉiuj formatoj (eĉ la fizikaj KDj!) de VINILKOSMO troveblas ĉe la retejo:

<https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/>

Esperanta Festivalo de Tajvana Literaturo

okazos la 28/30-an de marto 2018 en Tainan k. Pingtung (Tajvano) organizata de Tajvana Muzeo de Literaturo kaj de Pingtung Universitato (hsia@mail.com).
<https://vergnaudcyril.wordpress.com/category/esperanto/>

Lorenc en ĵurnalo Metro

La 4-an de januaro 2018 en kvizo de la ĵurnalo Metro aperis jena demando: Lingvisto František Vladimír Lorenc estas konata kiel aŭtoro de la unua ĉeĥa lernolibro de a) gestlingvo, b) la japana, c) Esperanto. Verŝajne la demandon inspiris nove eldonita biografio pri Lorenc de V. Novobilský.

Oferto de Stano Marček

Specialan oferton de publikaĵoj petu ĉe:
stano.marcek@gmail.com

Temas pri lernolibroj, fabeloj, peksesoj. Por ĉiuj titoloj (eĉ se mendotaj unuekzemplere) **40%-a rabato**. Se vi krom lernolibroj mendos almenaŭ 5 diskojn (Modela elparolo, sonlibroj kun fabeloj aŭ poezio, Kantoj por E-kursoj, Instruaj Bildoj, AV-kurso por progresintoj), la afrankon pagos mi.

Stano Marček

Kosmo Strategio Ltd.

Kosmo Strategio estas internacia firmao specialiĝinta pri projekt-mastrumado, strategia planado, edukado kaj teknologi-transdonado. Ĝi laboras en Edinburgo (Skotlando), Londono (Anglio), Munkeno (Germanio) kaj Bjalistoko (Pollando) kaj povas provizi tre bonkvalitan subtenon por viaj agadoj.

<http://kosmo.eu.com/?lang=eo>

Esperanto en Mahen-biblioteko

La 26-an de februaro 2018 en programo por senioroj *Kultura akademio de la tria aĝo* (<http://www.kjm.cz/ka3v2015>) okazos prelego de Josef Vojáček **Esperanto kaj komunikado** (je la 16.30 h).

Židovské listy pri Zamenhof

En n-ro 5778-43/2017 de Juda Gazeto sur p. 33-34 aperis artikolo (ĉeĥlingva) de Petr Chrdle „100 jaroj de post la forpaso de Ludoviko Zamenhof, esperanta viziulo de homeco“. La artikolo informas ankaŭ pri F. V. Lorenc, bahaismo, homaranismo.

Greziljono

2018-maj-09/13: ReVe, Renkontiĝo Vegana

2018-jul-09/27: Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj

2018-jul-09/16: Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso

2018-jul-16/21: Turisma semajno kaj Esperanto-kurso:

2018-jul-21/27: Internacia E-Konferenco de OSIEK „Esperanto en Artoj“
kastelo@gresillon.org

Lada-bildkartoj el Japanio

Nia ŝatata pentristo Josef Lada (1887-1957) naskiĝis en la sama jaro kiel Esperanto, tial pasintjare estis festata ankaŭ lia jubileo. Ekzemple en la kastelo Miroslav aranĝis ekspozicion de Lada-bildkartoj s-ro Alois Urbánek el Paso-



hlávky, kiu posedas la plej grandan kolekton de tiaj bildkartoj (ĉ. 2 800). Li estas enskribita en la libro de rekordoj en Pelhřimov. Tamen 7 bildkartoj, eldonitaj en Japanio, al li mankis kaj ĉiuj provoj akiri ilin per la angla lingvo fiaskis. Tial li turniĝis al la redakcio de Starto, ĉu tio ne eblus per Esperanto?

Mi alparolis rete la japanan amikon Kapao (Isikawa Kazuya) kaj li efektive helpis. S-ro Urbánek prezentis parton de sia kolekto kaj la sep novajn bildkartojn en la januara Regiontour en Brno, kie ni renkontiĝis. Ĉie li fieras, ke la bildojn akiris por li esperantistoj.



foto-arkivo de A. Urbánek

Sinjoro Alois Urbánek kun parto de sia kolekto kaj sep bildkartoj el Japanio.

Miroslav Malovec

Kiel ekestis nova vortaro

(fino)

Sekve kontrolis la vortaron ankoraŭ Karel Votoček kaj hungaro Joseph Horvath.

Tri tagojn antaŭ la Universala Kongreso en Nitra mi finis la lastan literon kaj en Nitra kun Petro Chrdle subskribis kontrakton. Sed poste daŭris ankoraŭ unu jaron kontroloj, ekz. Zdeněk Pluhař relegis ĉion ankoraŭ unufoje kaj trovis multajn mankojn. Nova kontrolanto estis ankaŭ Jindřich Košťálek kaj fine la ĉeĥan lingvon kontrolis Helena Pšeničková. La enpaĝigon en du kolumnojn faris Jaroslava Malá, sed tio kaŭzis novajn problemojn, precipe ĉe dividado de vortoj. Ĉeĥajn vortojn ni kontrolis ĉe Reta Lingva Manlibro (*Internetová jazyková příručka*), ĉar se vi tie skribos iun ĉeĥan vorton, ĝi montros, kiamaniere ĝi estas dividebla (ekz. arit- me- ti- ka). Ĉe la Esperantaj oni dividas laŭ morfemoj (prefikso-radiko-sufikso) aŭ laŭ silaboj, sed ne eblas memstarigi la tildon, tiun ondon, kiu anstataŭas la radikon: patr/o, ~ino (ne eblas ~- ino).

Fine ĉiuj problemoj estis solvitaj kaj la vortaro povis iri en la presejon.

Kaj kion plu?

Post kelkaj jaroj, kiam la libro estos disvendita, mi donos je dispono ankaŭ ĝian elektronikan version, por ke la juna generacio povu daŭrigi mian laboron eĉ post mia morto, ĉar tian vortaron necesos ĉiam kompletigadi per novaj vortoj.

Same mi provos aktualigi ankaŭ la ĉeĥan-Esperantan version, kiu estas eĉ pli grava, ĉar ĝi devas helpi, ke Esperanto kapablu ĉion esprimi.

Miroslav Malovec

Tosto de Zamĉjo

La dekseca TOSTO okazis en Pardubice la 3an de decembro 2017. Estis bela, sed frosta tago. Venis pli ol 20 personoj kiel de Pardubice, tiel el la ĉirkaŭajo. Verda pordego estis jam fermita pro teknikaj kialoj, tamen peto por duonhora malfermo helpis, kiel vi vidas el la dua foto.



Apud Verda pordego estas Mariankolono kaj ĉe ĝi ni tostis omaĝe de Zamĉjo kaj gustumis la torton speciale faritan de nia membrino.

Kaj ĉar jam en Pardubice estis ornamita kristnaska arbo, ne mankis foto, per kiu ni deziras trankvilajn festojn kaj sukcesan novan jaron 2018 al ĉiuj bonaj homoj.

Jarmila Rýznarová.

Biblioteko F. V. Lorenc

Laŭ la decido de la komunuma konsilantaro en Vrďy (al kiu nun apartenas la naskiĝvilaĝo de F. V. Lorenc Zbyslav), la loka publika biblioteko portos de post ĉi-jara julio la nomon de F. V. Lorenc.

Dimanĉe la 8-an de julio ekde la 14-a horo okazos la solenaĵo, ene de kiu estos senvaligita memortabulo farita de esperantisto Zdenĉk Myslivec, i.a. aŭtoro de la memortabulo omaĝe al Josef Hradil en Skokovy. La solenaĵon partoprenos ankaŭ la ĝenerala konsulo en Brazilo s-ino Pavla Havrlíková kun sia edzo kaj intereson montris ankaŭ Fernando Lorenz de Azevedo, la pranepo de F. V. Lorenz. Ĉiuj esperantistoj estas kore invitataj.

Pri la eksterordinalaj vivo kaj verko de F. V. Lorenc eblas konatiĝi en la verko de Vlastimil Novobilský "František Vladimír Lorenc", kiu aperis en la jaro 2017 ĉe la eldonejo KAVA-PECH, kaj en la ĉeĥa originalo, kaj esperantigita fare de Margit Turková: www.kava-pech.cz.

Nia prezidantino magistriĝis

Ĉe la universitato Palacký en Olomouc magistriĝis Libuše Hýblová, nia prezidantino, per diplomlaboro *Dobrovolnictví v domovech pro osoby s mentálním postižením* (Volontuleco en la hejmoj por personoj kun mensa handikapo) komence de februaro 2018. Sinceran gratulon!

Kluba vivo

Prostějov: La 28-an de decembro 2017 la klubanoj adiaŭis la malnovan jaron



kaj la 1-an de februaro 2018 realiĝis la kluba jarkunveno.



Přerov: La tradicion antaŭkristnaskan renkontiĝon de la esperantistoj okazigis la Esperanto-klubo de Přerov en salono de restoracio de Bierfabriko de Přerov.



La renkontiĝon krom la lokaj klubanoj ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de E-kluboj de Olomouc, Prostějov, Hranice kaj Kroměříž. La urbana magistrato reprezentis al la klubanoj jam bone konataj du reprezentantinoj: s-ino Inĝ. Daniela Novotná - la sekretario de la urbestro kaj s-ino Lenka Chalupová - la proparolantino de la urba magistrato kaj konata verkistino de Přerov, kiu per lego de la fragmento el sia plej freŝa psikologia romano Ptačí žena (Birda virino) ĝin tie prezentis. La renkontiĝo okazis en tre agrabla amikeca medio kaj ĉiuj ĉeestintoj esperas denove renkontiĝi okaze de la kluba jarkunveno okazanta samloke la 21-an de marto de la 16-a horo. Do ĝis la revido denove la 21-an de marto en Přerov!

Miloslav Šváček

Olomouc: La 9-an de decembro 2017 en la klubejo de SONS en Olomouc okazis antaŭkristnaska renkontiĝo de esperantistoj el najbaraj kluboj.



Brno: Ĉiumerkrede renkontiĝas esperantistoj por aŭskulti prelegojn, kiuj ofte estas elŝuteblaj ĉe: <http://esperantobrnno.cz/malnova/elsutu.html>



Václav Zouzalík prelegas pri neŭtrala esprimado en Esperanto (14.12.2017)

Ni kondolencas



■ La 7-an de decembro 2017 mortis s-ro **Stanislav Bršlica** (86-jara), kiu dum multaj jaroj gvidis klubon en Znojmo kaj priskribis ĝian historion en du ĉeĥlingvaj artikoloj, unu pri la postmilita kluba agado kaj dua (komune kun Viktor Dvořák) pri serĉado de la komencoj de Esperanto en Znojmo en 1908.




■ La 12-an de decembro 2017 forpasis s-ino **Marie Opplerová** (75-jara), kiu dum sia juneco laboris en junularo de Ostrava-Poruba.

■ La 5-an de januaro 2018 mortis s-ro **Alois Jakubec** (80-jara) el Hranice (dek tagojn post kiam li estis faligita de aŭtomobilo). Lia filatelista ekspozicio „Historio de Esperanto“ estis prezentita septembre 2014 en la Urba Muzeo kaj Galerio en Svitavy (Starto 3/2014, p. 95). La ekspozicion li poste donacis al nia Esperanto-muzeo. Li estis prezidanto de la klubo en Hranice, profesie maŝinfakulo.



S-ro Jakubec antaŭ sia kolekto



■ la 25-an de januaro 2018 forpasis s-ro **Milan Smělý** (72-jara) el EK Prostějov.

Jubileoj komence de 2018

Angelov Kyril, Pardubice

Beneš Jaroslav, Třebíč

Čech Stanislav, Dubňany

Filová Milada, Hranice

Ing. Holajn Lumír, Ostrava-Hrabůvka

Chalabová Vlasta, Plzeň

Klumpar Alois, Česká Třebová

Milev Georgi, Karlovy Vary

Pejchl Petr, Karviná

Ing. Plicková Ivonna, Čelákovice

MUDr. Škoda Vladimír, Bučovice

Sinceran gratulon!

KOREKTO DE FALSA INFORMO:

La Esperanto-klubo Benešov festas sian 35-JARAN datrevenon, ne nur 20-jaran, kiel mi nekorekte anoncis en Starto 4/2017. Ĉe tiu ĉi okazo ni, nuntempaj klubanoj, invitas ĉiujn iamajn anojn de la klubo kaj ankaŭ ĉiujn esperantistojn, kiuj deziras festi nian rememortagon kaj krom tio travivi agrablan tempon. Antaŭtagmezon ni travivos en la klubejo, kie estos eta manĝorefreŝiĝo. Post komuna tagmanĝo okazos trarigardo de la urbo kaj vizito de parko kaj kastelo Konopiště - pere de urba vagonareto.

Kunveno okazos la 19-an de majo ĉirkaŭ la deka horo en la klubejo SPOLEK SENIORŮ, M. Kudeříkové1556, Benešov.

Vagonar-venantojn ni atendos en stacidomo Benešov. Ni antaŭĝojas Vian viziton!
LChal

Kun Viaj eventualaj demandoj turnu je:

L.Chaloupková, tel. 732 415 094, e-mail leonarda.ch@seznam.cz

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, tel. **723 672 335**, e-mail: polnickypavel@seznam.cz. Předplatné uhradíte na účet u **Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.



Monato: 1300,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 780,-Kč
La Gazeto: 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: nur reta versio 410,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5, reta versio 190 Kč

Literatura Foiro: 1220,- Kč (*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5 (*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
49. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
<http://www.esperanto.cz/starto>

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2018

-
Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
49-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

<http://www.esperanto.cz/starto>

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 7.5.2018

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

KALENDARO

2018-02-08/03-04 Hodonín: Je esperanto mrtvý
jazyk?

Info: pavla.dvorakova@esperanto.cz

2018-02-28 Esperanta meso en Prago

2018-04-13/15 la 13-a BIERO Třeboň

Info: e-mentalprago@seznam.cz

2018-05-02/06 Skokovy

Info: drahotova@esperanto.cz

2018-05-19 35 jaroj de EK Benešov

Info: leonarda.ch@seznam.cz

2018-06-17 Grimpo al Granda Ĉantorio

Info: suchanekj@seznam.cz

2018-07-15/28 2-a etapo Lančov

2018-07-29/08-10 3-a etapo Lančov

2018-08-10/12 Lančov: Renkontiĝo de eksaj
tendaranoj, Info: <http://set-lancov.cz/>

2018-08-06/13 Poděbrady: Ekumena kongreso,
Info: polnickypavel@seznam.cz

2018-09-14/16 Dek jaroj de Esperanto-Muzeo
en Svitavy, Info: muzeum@esperanto.cz

2018-10-12/14 Konferenco de ĈEA en Benešov

Info: leonarda.ch@seznam.cz

2018-12-08 Antaŭkristnaska Renkontiĝo en
Písek, Info: pisek@esperanto.cz

2018-12-29 Silvestro en Česká Třebová
Info: jk.esperanto@seznam.cz

Eksterlande

2018-03-07/11 Bibliaj Tagoj en Mainz

2018-05-19/25 IFEF-kongreso en Wrocław

2018-05-19/21 Eŭropa Festivalo de Esp. Kantoj
en Vroclavo (PL),

Info: informado.eo@gmail.com

2018-07-14/22 SES, Slovakio,

Info: <http://ses.ikso.net/2018/>

2018-07-28/-08-04 UK Lisbono

<https://uea.org/kongresoj/UK/2018>

2018-10-18/21 KAEST Modra-Harmónia
<http://kaest2018.ikso.net/>



PLI DA INFORMOJ ĈE

<http://www.esperanto.cz/eo/akce>

www.eventoj.hu/kalendaro.htm



Jolana Haan Smyčková, Jitka Molavcová, Jiří Suchý kaj infanoj Kristian Haan kaj Lea Hurábová en antaŭkristnaska Semafor (rigardu artikolon sur la paĝoj 10-11).

Foto Dušan Dostál



Teatro DOMA en Koreio ankaŭ ekskursis.



La deka Tosto de Zamĉjo
en Pardubice
3.12.2017



Propono de la memortabulo
honore al F. V. Lorenc
sur la muro de la biblioteko en Vrды,
kiu portos lian nomon